



Esperanto en Danio

20-a jarkolekto • n-ro 3 • aŭgusto 2013

ESPERANTO
2013
Justa komunikado

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder

Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk

Ĝirokonto: 1551-805 7370

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Finn Østerbæk (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Bent Jensenius

Peter Wraae

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup

☎ 52 64 44 72 eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresânĝoj al:

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.11.2013

Enhavo

Novaj defioj atendas nin.....3

Vizito en Herzberg-am-Harz.....4

Kiel gramatiko kaptis mian atenton...7

Pri partopreno en SES 2013.....8

Kopenhagaj okazontaĵoj.....9

Muzikfestivalo en Ballerup.....11

“Popolkunveno” 2013 en Bornholm.13

Esperanto en la Roskilde-festivalo...14

La nova estraro de UEA.....15

125-jariĝo de la unua klubo.....16

UEA pri rajtoj de indiĝenoj17

Ni funebras:

Arne Alexander (1922-2013).....19

Werner Bormann (1931-2013)20

Hermano Bermano (1935-2013).....21

Rerigardo al la historio.....22

Novaj defioj atendas nin



La 98-a kongreso en Islando alportis novajn defiojn: la nova strategia plano estis finfine akceptata post 3-jara laboro. Kiel membro de la strategia komisiono, mi mi estis parto de tiu laboro kaj de la diskutoj. Dum la sekvaj jaroj ni povos konstati ĉu ĝi alportis la bezonatajn ŝanĝojn por ke nia movado faru paŝon antaŭen en la ĝusta direkto. Pluraj novelektitaj estraranoj estis membroj de la strategia komisiono, kaj oni povis noti ilian entuzi-

asmon rilate al la defioj por plenumi la strategian planon. La ĝisnuna plano estis pli simpla kaj havis 3 agadkampojn: informado, instruado, utiligado, dum la nova plano havas 4 agadkampoj: konsciigo, kapabligo, komunumo, kunordigo. Ĝi konsistas el 35 paĝoj kaj estas iom ampleksa kaj peza legado, sed oni planas fari pli simplan version.

Enlande ni daŭrigas niajn planojn kaj la venontaj monatoj estos speciale aktivaj: fine de aŭgusto, de la 23-a ĝis la 25-a pola muzika kaj popoldanca grupo kaj grupo de junaj kantistinoj estos gastoj ĉe la Musikfestivalo en Ballerup. Ilin gvidas nia samideanino Halina Komar. La membroj kiuj pasintjare partoprenis la jarkunvenon de DEA en Berlino havis okazon konatiĝi kun la grupo. La 1-an kaj 2-an de septembro ni partoprenos kiel kutime en la evento “gustumu la mondon” (smag verden) kiu ĉi-foje okazos en Prags Boulevard en Amager. La 21-an de septembro, por la Tago de Paco ni denove en kunlaboro kun aliaj pacaj asocioj aranĝas programon. Kaj fine en novembro ni partoprenas denove la Librofoiron en Bella-Centro. Do, entute vigla aŭtuno atendas nin, kaj ni rekomendas niajn membrojn partopreni en tiuj aranĝoj, pri kiuj ni informos ĝustatempe pli detale.

Kelkfoje mi aŭdas la demandon: kial Esperantro ne sukcesas. Por sukcesi ni devas esti videblaj al la ekstera mondo kaj partopreni en diversaj agadoj kie ajn eblas, t.e. kiam niaj idealoj kaj celoj ne kolizias kun aliaj. Do, novaj defioj ĉiam atendas nin!

Ileana Schrøder

Vizito en Herzberg-am-Harz

En majo kune kun du geamikoj mi aŭte vizitis la Esperanto-urbon Herzberg-am-Harz. La celoj de nia vizito estis diversaj: la turismado, la ripozado kaj la liverado de libro-duoblaĵoj de la KEK-biblioteko al Interkultura Centro.

Tiu estis nia unua vizito al la malgranda sed plaĉa urbo, kiu situas en la belnatura regiono de suda Malsupra Saksio. Ni volis esperantumi, vagadi kaj ripozi, tial ni elektis tranokti en Hotelo *Zum Pass* en la trankvila vilaĝo Siebe, kiu troviĝas proksimume sep kilometrojn for de Herzberg. La decido estis trafa, ĉar tre plaĉis al ni la antikva hotelo komforta, kiu havas ĉarman etoson kaj bonan restoracion. Tie oni parolas Esperante, la servado estas bonega kaj ŝajnis al mi, ke kiel esperantistoj ni ĝuas eĉ pli bonan gastamon! La ĉirkaŭaĵo de la hotelo estas paradizo por promenantoj. Se ni ne havus aliajn celojn, ni volonte restus en Siebe la tutan tempon, sed Herzberg kun siaj miridindaĵoj ankaŭ atendis nin.



La unikorna kaverno

La matenon post nia alveno ni liveris la librojn kaj ricevis elkoran bonvenigon de Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródi en la Interkultura Centro. Kvankam ili certe estas du el la plej konstante okupataj esperantistoj en Esperantujo, ili detale kaj entuziasme informis nin pri sia agado. Ni ne estis aliĝintoj de la semajnfina seminario, komencota la saman tagon,

tamen ili invitis nin partopreni la posttagmezan vagadon al la montopinto de *Großer Knollen* (687 metron alta), la vesperan manĝon en la ĝardeno de nia hotelo, la vesperan kurson kaj la sekvatagan ĉiĉeronadon en la urbo kaj la oficialan komunuman akcepton en la kastelo. Ni dankeme akceptis ĉiujn proponojn. Do kune kun Peter, Zsófia kaj vizitantaj esperantistoj el Germanio, Kroatio, Meksikio, Nederlando kaj Pollando ni ĝuis tre plezurajn kaj interesajn travivaĵojn.

Ursula kaj Tomaso revojaĝis hejmen unu tagon pli frue ol mi, ĉar ili devis labori, sed mi estis daŭrigonta la vojaĝon al Munkeno kaj Nuremburgo. Tial en la lasta komuna tago ni decidis sendepende viziti la unikornan kavernon. Oni tie iam trovis ostojn de giganta kaj mistera mambesto. Ĉar oni nenion sciis pri ĝi, naskiĝis legendo pri unikorno. Antaŭ multe da jarcentoj homoj vizitis la kavernon. En la jaro 1786 la filozofo Gottfried Wilhelm Leibniz rakontis post sia vizito pri vigla komerco de unikornaĵoj kiel sekspotenca plifortigilo. Ekster la kaverno estas informtabulo esperantlingva kaj ankaŭ broŝuro haveblas.



La Zamenhof-busto en Herzberg

Herzberg-am-Harz ricevis sian oficialan kromnomon la Esperanto-urbo la 12-an de julio 2006.

Post nur sep jaroj pro la diligenta agado de Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródi Esperanto estas videbla kaj spertebla en la urbo – ekzemple:

- En la urbo estas 15 vojmontriloj Esperantaj.
- En parko estas informŝildoj pri diversaj arboj.
- En la ĉirkaŭaĵoj de la urbo estas kvar bonvenigaj ŝildoj esperantlingvaj.
- Naŭ restoracioj en la urbo havas esperantlingvajn menukartojn.
- Troviĝas Esperanto-muzeo en la kastelo de Herzberg.
- La urbo havas Zamenhofan statuon kaj monumenton de Joachim Gießner (li estis fama germana esperantisto.)

Ĝemelurbaj kontaktoj inter Herzberg kaj Góra en Pollando prosperas kaj funkcias Esperante. En aprilo 2005 la urbestroj de Herzberg kaj Góra, Gerhard Walter kaj Tadeusz Wrotkowski, eklernis Esperanton. En ambaŭ urboj lernejoj infanoj lernas Esperanton.

La urba hejmpaĝo germana enhavas ampleksan informon pri Esperanto kaj ties rolo en Herzberg (tajpu <http://www.herzberg.de>).

Krom tio la kulturaj kaj klerigaj servoj de la Interkultura Centro estas avantaĝaj por esperantistoj ie ajn.

La agado de Interkultura Centro Herzberg famas en Esperantujo, tamen kion opinias herzberganoj pri Esperanto? La infanoj lernas la lingvon, sed ĉu la lingvo allogas plenkreskulojn? Ne parolante la germanan, se ni erarvagus en la urbo, ĉu iu ajn preterpasanto kapablas helpi nin? Ĉu troviĝas Esperanto-parolantaj komizoj kaj kelneroj en la urbaj butikoj kaj restoracioj?

Nia vizito al Herzberg estis mallonga, tial niaj spertoj estas limigitaj. Ni manĝis kelkfoje en restoracioj, ni iomete butikumis kaj ni hazarde babilis kun kelkaj herzberganoj, sed neniu el ili scipovis/emis paroli Esperanton. Tamen ili sciis pri la lingvo, kaj plej grave neniu subridaĉis, kiam ni demandis: 'Ĉu vi parolas Esperante? En restoracio ni petis al la kelnerino, ke ŝi donu al ni la Esperantan manĝkarton. Ŝi replikis: "Bedaŭrinde, tion ni ne havas. Tamen mi jam sendis la germanan al Zsófia, kaj ŝi certe baldaŭ sendos al ni la Esperantan version." En restoracio iom for de Herzberg ni ankaŭ petis manĝkarton Esperantan. "Tian ni ne havas, tamen ŝajnas al mi,

ke herzberganoj bone profitas pro Esperanto.”

Do mi havas impreson, ke tiu estas unu el la plej grandaj sukcesoj de Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródi! En Herzberg-am-Harz oni scias pri Esperanto, respektas ĝin kaj konscias, ke ĝi utilas. Ni bone scias, ke oni ne konstruis Romon dum unu tago.

Kiel ni helpas ilin? Vizitu la urbon, aŭ kiel turisto aŭ kiel kursano. Post la vizito eventuale verku artikolon dane por via urbo-gazeto aŭ Tripadvisor www.tripadvisor.dk.

Betty Chatterjee

Kiel gramatiko kaptis mian atenton

Nun mi ne nur aŭskultas la elsendojn en la radio. Mi ankaŭ rimarkas la esprimmanieron. Antaŭ monatoj mi komencis traduki la detalan gramatikon en la renovigita retejo de lernu!. Tie la gramatiko troviĝas en 62 lingvoj. La vortokategorioj estas por ni ordigitaj en sub-eroj. Aktuale la dana parto estas 73,4% pretigita. Do, mankas ankoraŭ kvarono.

Multajn el la gramatikaj vortoj mi ne konas. Danke al aranĝo de la dana gramatiko tradukita al Esperanto, mi facile trovas la plej multajn el la esprimoj por mia tasko. Tie estas ankaŭ klarigoj kaj ekzemploj de la uzo. Impone la tuto estas kolektita en malgranda kajero, “ESPERANTO, lille grammatik for dansktalende”. La enhavlisto prezentas ankaŭ la fak-esprimojn, kiuj ĉefe estas latinaj vortoj.

Je dubo pri la formulado de korekta teksto, mi povas enrigardi, kiel la aliaj tion faris. Mi trovas inspirojn ĉe la lingvoj: sveda, norvega, germana kaj angla – se ili jam tie tradukis.

Estas la plej utila maniero por lerni lingvon. Ofte mi pensas, aha! tiel kaj tial. La vorto “aŭtodidakte” diras al mi pli multe. Se mi volas regi ankaŭ mian propran lingvon, mi prefere konu la rolon de la vortoj kaj frazpartoj. Esperanto donas pli vastan manieron por esprimi sin.

Estis interese aŭdi pri la BEK-kurso, kiu estas sengramatika. Certe oni povas per ĝi rapide lerni Esperanton. Sed mi ne volus rekomendi la manieron.

Jytte Sunekær

Pri partopreno en SES 2013

Mi decidis partopreni ĉi-jare en la Somera Esperanto-Studado en Slovakio por sperti tiun seminarion kaj povi rekomendi ĝin al niaj kursanoj. Por la unua fojo SES okazis en la urbo Martin nordoriente en la lando, preskaŭ ĉe la landlimo kun Pollando. Martin estas ĉirkaŭata de Altaj Tatroj, la plej alta kaj grava montaro en Slovakio, kaj la vetero spegulis tiun najbarecon, ŝanĝiĝante rapide dum la tagoj. SES 2013 okazis sub la aŭspicio de la Ministro de Edukado, Scienco, Esploro kaj Sporto, de la prezidanto de la memrega distrikto de Žilina, kaj de la Urbestro de la urbo Martin.



La instruista teamo konsistis el 12 spertaj instruistoj kaj oni povis facile trovi sian nivelon kaj klason. La instruado okazis antaŭtagmeze kaj alispecaj programoj okazis posttagmeze kaj vespere. Por la plej lertaj aliĝintoj estis organizitaj diversaj interesaj prelegoj. Mi spertis la instruadon de Zlatko Tisljar, kiu instruas pere de la Zagreba metodo, kaj konstatis ke ĝi tre efikas por frua ekparolo de la lernantoj. Ankaŭ Stano Marček instruis la komencantojn, pere de sia tre konata de ni libro “Esperanto per la rekta metodo”. En la klasoj de la plej altaj niveloj la prelegantoj dnis amuzajn kaj interesajn taskojn al la lernantoj.

Oni povis partopreni en 2 tuttagaj ekskursoj, sed estis ankaŭ ebleco partopreni en duontagaj ekskursoj. Mi partoprenis la ekskurson al la kastelo de Bojnice, kaj al la bestoĝardeno situanta en la parko de tiu kastelo. Temas pri romantika kastelo en meza Slovakio, vere impona konstruaĵo, kun parte origina gotika kaj renesanca bazo.



Kastelo Bojnica

Entute estis agrabla kaj rekomendinda sperto, kio atestas la sukceson de SES, interalie pere de la nombro de partoprenantoj kiu ĉiujare kreskas. Mia scivolemo: kie okazos la venonta SES? Ĉar preskaŭ ĉiujare ĝi okazas en alia slovaka urbo.

Ileana Schrøder

Kopenhagaj okazontaĵoj

Ĉiuj kunvenoj de Konversacia Esperanto-Klubo, Kopenhago, okazas en la Kulturdomo, Tomsgårdsvej 35, 2400 København NV, ekde la 19-a ĝis la 21-a horo. Prezidanto kaj kontaktulo: Peter Wraae, telefono +45 6070 7969, retroŝto peter@wraae.dk.

- 19.08 Amri Wandel: Astronomio (YouTube) Universitato de Esperanto: www.universitato.info
- 23-25.08 La polaj junulinoj gvidataj de Halina Komar kantos en la Festivalo pri muziko kaj folkloro en Ballerup.
- 26.08 Novelo. Studgrupo gvidata de Bent Jensenius. -- Tre taŭga en ĉi tiu tempo de reformoj por instruistoj estas la novelo Ebrivirgeco de Marjorie Boulton:
<http://esperanto.net/literaturo/noveloj/11.html>. (Kompreneble, ni ĉiam povas paroli pri la antaŭaj noveloj. Tempo Fuĝas de William Auld estas taŭga kiel “rezervaĵo”).
- 31.8-01.09 “Smag Verden”. DEA havos budon en Prags Boulevard en Amager inter 12h kaj 18h.
- 01.09 Aŭtuna merkato en Ballerup. Ina Schultz gvidos. Ŝi proponas ke ni kunvenos sur Ballerup Stacio je la 11.00. Se estas homoj kiuj ne povas piediri, Ina kaj mi havas aŭtojn. El tie ni piedvojaĝos al Pederstrup kio daŭros duon horon. Tie ni facile kaj malmultekoste povas aĉeti sandviĉojn de ekologia kvalito. Telefonnumero de Ina: 25813018, se ni havas demandojn.
- 02.09 Ronald Glossop: Alfronti militon. (YouTube) Universitato de Esperanto. <http://www.universitato.info>.
- 09.09 Spertoj de Tvind. Peter Wraae. Mi sekvis en 1973 kurson en Tvind, kiu estas tre konata lernejo, kiu havis propran pedagogian sistemon. Tiam ĉiuj gazetoj skribis tre pozitivajn artikolojn pri la loko, kaj mi ŝatis la ideon vojaĝi en la mondo kaj lerni per tio. -- Mi surpriziĝis kiam mi ekkonis la lernejon, mi trovis fermitan, nedemokratian diktatoran sistemon kiu ne zorgis pri homoj. Post krizo mi forlasis la lokon, kaj poste mi faris multajn prelegojn pri miaj spertoj. Mi montros al vi fotojn el nia vojaĝo tra la Sahara Dezerto al Niĝerio kaj Ganao.
- 16.09 Novelo. Studgrupo gvidata de Bent Jensenius. -- La vekiĝo de Ferenc Szilagy: <http://esperanto.net/literaturo/noveloj/08.html>.
- 21.9** Tago de Paco. Inter 10h kaj 12:30h estos kunveno pri “kreaĵ pac-procezoj” en salono “Møderiget” de la sidejo de Mellempfolkeligt

Samvirke, Fælledvej 12, Nørrebro.



- 23.09 Ana Røssum prezentos kvizon.
- 30.09 Kantvespero kun Michael kaj la fratoj Dalmose.
- 07.10 Vespero por la komencantoj. Mi prezentos UK en Reĵjaviko kaj montros fotojn pri la evento, kaj pri mia vojaĝo post la kongreso. Peter Wraae.
- 14.10 Ne estos programo pro la aŭtuna ferio.

Muzikfestivalo en Ballerup

Fine de aŭgusto, precize de vendrede la 23-a ĝis dimanĉe la 25-a de aŭgusto okazos en Ballerup Muzikfestivalo, kie kantos kaj dancos interalie du polaj grupoj, nome *Sadeczane* kaj *Youth Voice* sub la gvidado de Halina Komar, prezidinto de la pola landa organizo. Niaj membroj kiuj ĉeestis la jarkunvenon de DEA lastjare en Berlino konatiĝis kun tiu grupo, kiu dancas popoldancojn de sia regiono.



Jen la programo de la grupo Sadezczane:

Vendrede la 23.8: 14.00 – 14.30 en Grantoftecenter
” ” 19.40 - 20.10 en Musikfestscenen

Sabate la 24.8: 11.00 - 11.30 en Biblioteket
” 16.45 - 17.30 en la scenejo Under Uret
” 21.00 – 21.45 en Rytmscenen

Dimanĉe la 25.8: 12.25 – 12.55 en Musikfestscenen

La grupo Youth Voice estas grupo de junaj knabinoj kiuj kantas en la pola lingvo kaj en Esperanto

Jen ilia programo:

Vendrede la 23.8: 22.15 – 22.45 en la scenejo TUK-TUK

Dimanĉe la 25.8: 13.00 – 13.30 ” Under Uret

VENU aŭskulti kaj rigardi! La solena malfermo de la festivalo okazos vendrede 17.00 – 18.00 ĉe Musikfestscenen!

Pliaj informoj pri la diversaj scenejoj vi povas vidi ĉe la paĝaro de la festivalo:

www.ballerupmusikfest.dk

“Popolkunveno” 2013 en Bornholm

Por la unua fojo ni partoprenis en la evento “Folkemødet”, la sukcesa popolkunveno kie politikistoj renkontas la interesitan popolon. Ni partoprenis pere de la asocio “Fredsministeriet” (La pacministerio), kies membroj ni fariĝis ĉi-printempe, celante videblecon kaj kulaboron de nia asocio kun similcelaj asocioj (vidu mian artikolon en paĝo 3). La decido estis farita lastmomente, tamen ni sukcesis sendi nian junan membron Jonas Dalmose. Li povis ĉeesti nur 2 tagojn, des pli sukcesa fariĝis estis lia partopreno, ĉar la programo P4 de la dana radio intervjuis lin dum preskaŭ 9 minutoj.

Tiu amasa ĉeesto de pli ol 60.000 personoj donas ege gravan platformon al nia ĉeesto, kaj ni certe daŭrigos venontjare nian partoprenon.



Esperanto en la Roskilde-festivalo

DEJO (Dana Esperanto-Junulara Organizo) kaj Festoklubo jam dum 6 jaroj partoprenas en la muzikfestivalo de Roskilde. Ĉi-jare estis speciale, ĉar ili havis propran budon kaj organizon, sub la nomo *Glad Esperanto Mad* (kiu ne signifas “feliĉan E-frenezulon”, sed “gajan E-manĝaĵon”) ili vendis bongustan veganan manĝaĵon.

Ili invitis 60 esperantistojn el la tuta mondo por senpage festi kune kaj realigi la revon. Tio signifis kelkajn deĵorojn en la budo, kroman helpon ekster tiuj horoj, sed ankaŭ senpagan aliron al grandega muzikfestivalo kun famegaj artistoj, senpagan loĝadon kaj altkvalitan manĝon dum la tuta semajno, kaj ĉefe unikan etoson kun grupo de spertaj festemuloj.

Unika ŝanco por montri Esperanton al 100 000 homoj dum tuta semajno. Esperanto estis la laborlingvo en profesia medio, kaj la restanta profito restos en la movado.



La nova estraro de UEA



Prof. d-ro Mark Fettes el Kanado estis elektita kiel la nova prezidanto de Universala Esperanto-Asocio en la unua kunsido de la Komitato en la UK de Rejkjaviko. Fettes transprenas la prezidan stafeton de Probal Dasgupta, kiu gvidis la Asocion dum du oficperiodoj ekde 2007.

La kunsidon partoprenis 44 komitatanoj aŭ iliaj anstataŭantoj kaj 2 observantoj. Komence ĉeestis nur la komitatanoj A kaj B, kiuj alektis al la supera organo de la Asocio kvin komitatanojn C. Elektitaj estis Zsófia Kóródy (35 voĉoj), Julián Hernández Angulo (30), Jean Codjo kaj Stefano Keller (po 24), kaj Orlando E. Raola (21). Ne elektaj estis Marcel Delforge kaj Josep Franquesa Solé (po 17), kaj Johan Derks (9).

Poste la Komitato diskutis pri la nombro de elektotaj estraranoj kaj aŭdis sinprezentojn de la kandidatoj. Per plimulto de voĉoj oni akceptis la proponon de la Elekta Komisiono, ke la Estraro konsistu el sep membroj. Origine estis dek kandidatoj, el kiuj Johan Derks forfalis pro sia neelekto kiel komitatano. En la voĉdonado sukcesis Mark Fettes (43 voĉoj), Stefan MacGill (37), José Antonio Vergara (35), Lee Jung-kee (34), Martin Schäffer (33), Stefano Keller (30), kaj Barbara Pietrzak (24). Krome, Orlando Raola ricevis 23 kaj Amri Wandel 21 voĉojn.

La Estraro estas preskaŭ tute nova: nur Stefano Keller kaj Barbara Pietrzak membris ankaŭ dum la antaŭa oficperiodo. Du novelektitoj havas tamen antaŭan sperton pri la laboro en la Estraro: Mark Fettes estis ĝia membro 1992-1998 kaj José Antonio Vergara 2007-2010.

La nova Estraro ekoficis lundon, la 22-an de julio, post la akcepto de la Estrara Raporto pri la jaro 2012. Tuj post sia elekto ĝi tamen jam havis mallongan kunsidon por fari proponon al la Komitato pri la prezidanto, la vicprezidanto kaj la ĝenerala sekretario: respektive Mark Fettes, Stefan MaGill kaj Martin Schäffer. Tiun proponon la Komitato akceptis unu-anime. Pri la cetera taskodivido la nova Estraro decidis poste dum la kongresa semajno.

Osmo Buller

125-jariĝo de la unua klubo



En decembro 1888 la membroj de jam ekzistanta mondlingva asocio kiu tiam ekzistis en la germana urbo Nürnberg, decidigxis ke Esperanto estas la plej bona mondlingvo. Tiu decido faris la klubon la plej malnova Esperanto-grupon de la tuta mondo. Ĝi do nun festas la 125-jaran jubileon, kaj tiokaze la germana Esperanto-kongreso 2013 okazis pentekoste en Nürnberg.

Okaze de la jubileo, oni en majo solene inaŭguris kaj akvumis novan Esperanto-urbon kiun malavare pagis la Esperanto-grupo Nürnberg al la urbo Nürnberg. La evento okazis en la Hans-Sachs-Platz.

Do, se vi iam foje vizitos la belan urbon Nürnberg, nepre vizitu la Hans-Sachs-Platz kaj la Esperanto-urbon tie!

UEA pri rajtoj de indiĝenoj

La semajno 8-12 julio 2013 estis agadoplana por UEA-teamanoj ĉe UN en Ĝenevo, kiuj aktivis en la 6-a sesio de Ekspertaj Mekanismoj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj (EMRIP). Krom la ĉeftemo de la ĉi-jara kunsido, “Studo pri la aliro al justeco en la antaŭenigo kaj protektado de la rajtoj de indiĝenaj popoloj”, la kunvenintoj traktis ankaŭ la konkludan dokumenton de la evento okazinta junio en Alta, Norvegio, pretiginta la pintan UN-kunsidon de 2014: Monda Konferenco pri Indiĝenaj Popoloj.

Verena Graf, Adrian Tanner kaj Stefano Keller, reprezentantoj de UEA, ĉeestis en tiu signifa UN-evento, kiu okazas unufoje jare. Dum la semajno estis pluraj ebloj esprimi la opinion de UEA pri lingvaj rajtoj, ĉu dum specialaj kromkunvenoj, ĉu diskutante kun reprezentantoj de indiĝenaj popoloj kaj de aliaj NRO-oj.

Keller alparolis en du paralelaj eventoj. La unua konsistis el liaj gratuloj kaj dankesprimoj al la Ĝeneva organizaĵo doCip (dokumenta, informa kaj esplora centro por indiĝenaj popoloj, www.docip.org), kiu per siaj servoj signife kontribuas al la subteno de indiĝenoj, ĉefe helpante ilin dum koncernaj UN-eventoj kaj plurlingve disponigante dokumentojn. Tiu NRO konsilis kaj helpis ankaŭ al UEA en la organizado de la Simpozio pri lingvaj rajtoj, okazinta ĉe UN en 2008.

En sia dua alparolo, en la laborgrupa kunveno de Incomindios (Internacia komitato por indiĝenaj popoloj de Ameriko) Stefano Keller substrekis la gravecon de la interdependeco de lingva kaj biologia diversecoj kaj akcentis pri la neceso konservi la biokulturan riĉecon en la mondo, je kies bazo estas la defendo, pluvivigo kaj respekto de ĉiu etna lingvo, por kio UEA laboras. La ĉefprelegistoj subtene dankis lin por lia interveno.

La plej signifa elpaŝo de la estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj dum tiu EMRIP-sesio estis lia alparolo en la ĉefkunsido. Citante la punktojn 1 kaj 2 el la Artikolo 13 de la Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la rajtoj de indiĝenaj popoloj, li prezentis kazon de rompo de lingvaj rajtoj koncerne loĝanton de Svedio, kies gepatra lingvo estas la samea. Temis pri malfacilaĵoj de tiu persono por povi praktiki siajn lingvajn rajtojn, kiujn la leĝoj de la lando ja garantias al li por kontaktado kun publikaj oficejoj.

En rilato kun tiu kazo, Keller sin esprimis pri la pli kaj pli evidentiĝanta neceso atentigi ankaŭ pri la devoj respekti la rajtojn entenatajn en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

Keller rememorigis pri la malkontentiga situacio dum UN-kunsidoj, kie la neglekto, minimumigo de la lingva aspekto koncerne dokumentojn kaj parolajn lingvouzojn pluekzistas forme de privilegiigo de nur unu el la oficialaj lingvoj, la angla.

Poste, li informis la kunsidon pri la pionira paŝo de la registaro de Indonezio, kiu intencas enkonduki la instruadon de Esperanto en la studprogramon de diplomatoj. Dum la alparolo kaj okaze de personaj renkontoj kun du el la reprezentantoj de tiu ŝtato, Keller vigle gratulis ilin nome de UEA kaj substrekis, ke la uzo de neŭtrala kaj facile lernebla lingvo kiel Esperanto en la internacia komunikado signifas elmontrandon de respekto al ĉiu popolo, lingvo kaj kulturo. Li transdonis al la renkontitaj diplomatoj informajn dokumentojn, ekzemplerojn de la revuo “Esperanto en Indonezio”, kopion de la mesaĝo de s-ino Rita Izsák, UN-ĉefo pri minoritataj aferoj, sendita okaze de la 125-jariĝo de Esperanto, kaj la Esperantan version de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

Fine de sia alparolo Stefano Keller diskonigis detalojn pri la baldaŭ okazonta UK en Rejkjaviko, al kiu li kore invitis la ĉeestantojn.

Post la interveno venis gratulantoj al li, interalie junula delegacio el Germanio, kies membro diris al Keller, ke ĝis nun li opiniis pri Esperanto ke ĝi estas sensencaĵo, sed la alparolo de la ĉefreprezentanto de UEA konvinkis lin pri Esperanto. Li ricevis de Keller la plej lastan numeron de “Esperanto aktuell”.

Dum la kunsidaj tagoj okazis ankaŭ interparolo kun indiĝenoj cele al informado pri Esperanto kaj starigo de venonta kunlaboro, por kio necesas projekto kun tre klaraj enhavo kaj celoj, kaj responda al la atendoj de indiĝenoj, havante utilecon por ili, kiel ponto-lingvo kaj interligilo inter tradicio kaj moderneco.

Alparolteksto diverslingve, sonregistraĵo kaj video estas publikigitaj ĉe <http://www.lingvaj-rajtoj.org/eventoj/> .

[GazKom UEA]

Arne Alexander (1922-2013)

La 3-an de aŭgusto 2013 forpasis en la aĝo de 90 jaroj Arne Alexander, Espergærde. Laŭ eduko li estis instruisto, interalie pri la angla lingvo kaj gimnastiko, prezidanto de Rødovre Lærerforening, dum multaj jaroj viclernejestro.

Kun sia (unua) angladevena edzino Kay li esperantistiĝis en la 1950-aj jaroj kaj estis tre aktiva membro de Komuna Konversacia Klubo/Kleriga Konversacia Klubo (KKK). Arne havis grandan organizan talenton kaj brile plenumis la funkcion de LKK-ano pri Ekskursa Servo de la 47-a UK 1962 en Kopenhago. Al la diversaj ĉiĉeronoj li kaj Willy Pedersen ellaboris tre detalajn kaj modelajn manuskriptojn, valoregajn por ni.

Dum tutvespera instruista kunveno printempe 1963 ĉe Kirsten kaj Peter Zacho ni pridiskutis la ideon fondi novan, tutlandan Esperanto-organizaĵon de instruistoj, interalie kun la celo, ke ĝi transprenu de Centra Dana Esperantista Ligo la gvidadon de la Lerneja Kampanjo en Danlando. 3-persona grupeto – Arne Alexander, Ejnar Langkilde Rasmussen kaj Mogens Rude Andersen – estis komisiita ellabori projekton de statuto kaj aŭtune de la sama jaro inviti al fonda kunveno de Dana Ligo de Esperantistaj Instruistoj (Danske Læreres Esperantoforening) (DLE).

Dum multaj jaroj Arne serioze kaj akurate plenumis la taskon kiel sekretario de DLE. En ties estraro estis plenplena ĝuo kunlabori kun la tre realisma Arne, ĉiam noblakonduta. Baldaŭ ni transprenis ne nur la Lernejan Kampanjon, sed ankaŭ la Danan Esperanto-Ekzamenan Komisionon kaj ĝin funkciigis ĝis 2008. Estis la merito interalie de Arne, ke DLE sukcesis esti konsultrilate ligita al la dana instruista asocio (Danmarks Lærerforening) kiel faka suborganizaĵo.

Mogens Rude Andersen
prezidanto de DLE (1963-1966)
estrarano (1966-1970)

Werner Bormann (1931-2013)



Werner Bormann, doktoro pri ekonomiko kaj unu el la plej gravaj gvidantoj de UEA dum la lastaj jardekoj, forpasis la 16-an de majo en sia hejmurbo Hamburgo. Li naskiĝis en Berlino la 27-an de oktobro 1931. Bormann lernis Esperanton post la dua mondmilito. Li estis prezidanto de Germana Esperanto-Asocio 1967-1977 kaj reprezentis ĝin en la Komitato de UEA 1967-1995. Li gvidis la Lokan Kongresan Komitaton de la 59-a UK en Hamburgo en 1974. De 1971 ĝis 1980 li estis estrarano de UEA; 1974-1977 kiel vicprezidanto kaj 1977-1980 kiel ĝenerala sekretario. De 1992 ĝis 1995 li membris en la Financa Komisiono de UEA, kaj en

1993 li fariĝis Honora Membro de UEA.

Bormann estis membro de la Akademio de Esperanto 1976-2007 kaj en la periodo 1995-1998 ĝia prezidanto. Li estis ankaŭ orda profesoro de la Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino. Dum longa tempo li gvidis Germanan Esperanto-Instituton kaj instruis Esperanton en la Universitato de Hamburgo. De 2000 ĝis 2005 li estis prezidanto de FAME-fondaĵo. Dum jardekoj li aktivis ankaŭ en Hamburga Esperanto-Societo, kiu elektis lin honora membro en 2004.

Bormann estis aktiva preleganto kaj aŭtoro pri lingvaj, lingvopolitikaj kaj movadaj temoj. Interalie li kun Helmar Frank publikigis “Por plurlingveco de Eŭropo” (1994) kaj kiel ekonomikisto verkis “Mondkomerco kaj lingvo” (1993). En 2004 aperis kodooj kun liaj prelegoj en Hamburga Esperanto-Societo: “Mia Esperanto-vivo” kaj “Zamenhof”.

Por Werner Bormann Esperanto estis ankaŭ familia afero. Lia patro Artur Bormann estis konata interlingvisto kaj ankaŭ Honora Membro de UEA. Lia edzino Elsbeth Bormann, kiu mortis en 1996, estis elstara movadano, interalie kiel prezidanto de Germana Esperanto-Asocio; ankaŭ iliaj du gefiloj fariĝis esperantistoj kaj aktivis en la junulara movado.

Hermano Bermano (1935-2013)



La 29-an de junio forpasis la grava germana esperantisto Hermann Behrmann (aŭ Hermano Bermano, kiel li prefetis nomi sin en Esperanto). En la sepdekaj jaroj li fondis en Paderborno la asocion Esperanto-Centro, kiu ekde 2003 portas la nomon EsperantoLand; li prezidis la asocion dum pli ol du jardekoj kaj ĝis sia morto estis ties vicprezidanto.

Fine de la sesdekaj jaroj li verkis la lernolibron "Esperanto programita", kiu longe furoris en Germanio dank' al lia bona varbado; iutempe ĉiuj estraranoj de Germana Esperanto-Junularo (GEJ) estis lernintaj surbaze de tiu lernilo. Ĝi estis adaptita en plurajn lingvojn, inkluzive de la dana. Li eldonis la Specialan Cirkuleron por lernintoj kaj amikoj de Esperanto, organizis regionajn kunvenojn por ili kaj fondis internacian libroservon kaj abonservon. Dum multaj jaroj li aranĝis grupvojaĝojn al Universalaj Kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj.

Aldone al la serio de Esperanto Programita kun kvar kajeroj kaj sonmaterialo Bermano eldonis plurajn dekojn da libroj, el kiuj multaj estis verkitaj aŭ tradukitaj de Rikardo Ŝulco (Richard Schulz). Kelkajn pliajn librojn Bermano mem verkis aŭ kunverkis.

Per sia multflanka agado por la popularigo kaj lernado de Esperanto Hermano Bermano metis la bazon por la kresko de la Germana Esperanto-Junularo dum la sepdekaj kaj okdekaj jaroj. En la ejo de Esperanto-Centro en Paderborno Hermano dum pluraj jaroj gastigis la oficejon de GEJ kaj ties laborsemajnfinojn. En 1995 Germana Esperanto-Asocio agnoskis liajn atingojn per meritmedalo de GEA.

Rerigardo al la historio

La unua kongresa parolado de Zamenhof estis tiu de la unua kongreso en Bulonjo-sur-mar, norda Francio. Okaze de la 100-a UK en 2015 la Universala Kongreso okazos en Lille, pli granda urbo en la sama regiono.

Ĝis la 8-a kongreso (Krakovo 1912) oni nomis la kongreson “Internacia” kaj nur ekde la 9-a “Universala” (Berno, Svislando 1913). En sia parolado al la kongreso en Krakovo Zamenhof rakontis pri la atingoj de la movado

dum la unuaj jaroj. La homaj kvalitoj de Zamenhof estas konataj al multaj esperantistoj: humileco, mildeco, homamo, helpemo. Li diris, ke li ne volis esti ĉefo de la Esperanto-movado, kaj li petis al la kongresanoj en Krakovo: “Ĉesu vidi en mi Majstron, ĉesu honori min per tiu titolo”.



La Universala Kongreso en 1913 en Svislando estis la unua kongreso, kie Zamenhof propravole nur partoprenis kiel simpla kaj ordinara esperantisto. Kiam li akceptis oran medalon kaj bukedon, li humile diris: “Esperanto jam ne plu dependas de iu sola homo, nek de iu sola aro da homoj, por sia sukceso. Homoj povas veni, kaj homoj povas iri, sed Esperanto daŭrigos ĝis la

idealo pri internacia lingvo, kuniganta ĉiujn popolojn per ligo de komuna komprenado, estos atinginta sian venkan realiĝon por la bono de la tuta homaro.”

Ole Therkelsen

La lasta kongresa parolado de L.L. Zamenhof, antaŭ la Oka Kongreso Esperantista en Krakovo la 11-an de aŭgusto 1912

La unuaj vortoj, kiujn mi volas hodiaŭ eldiri al vi, karaj samideanoj, estas vortoj de kora gratulo, ĉar ni havas hodiaŭ grandan feston. Ĝus finiĝis dudek kvin jaroj de la tempo, kiam – post longa naska preparado – aperis

publike la lingvo, kiu nin ĉiujn unuigas, por kiu ni ĉiuj laboras kaj kiu enkorpigas en si tiun homofratigan ideon, kiun la plimulto el ni havas en sia koro kaj kiu dum dudek kvin jaroj flame instigadis nin labori, malgraŭ ĉia malfacileco kaj ĉiuj malhelpoj.

Dudek kvin jaroj da laborado por Esperanto kaj por ĝia ideo! Tion povas plene kompreni nur tiuj personoj, kiuj partoprenis en tiu laborado de la komenco ĝis nun. Bedaŭrinde tre nemultaj estas tiuj personoj. El la laborantoj de la unua tempo tre multaj jam delonge plu ne vivas, aliajn lacigis la malfacila, grandan paciencon kaj persistecon postulanta vojo, kaj ili malaperis el nia anaro. El tiuj personoj, kiuj troviĝas nun en ĉi tiu ĉambrego, la grandega plimulto en la unuaj jaroj de Esperanto nenion sciis pri ĝi aŭ neklare aŭdis pri ĝi nur kiel pri ia freneza, mokinda kuriozaĵo; tre multaj el vi en la momento de la apero de Esperanto estis ankoraŭ infanoj; multaj, kaj certe ne la malplej fervoraj el vi, en tiu tempo eĉ tute ne ekzistis ankoraŭ en la mondo. La grandega plimulto el vi aliĝis al nia afero nur tiam, kiam ĝi estis jam sufiĉe forta kaj elprovita. Tre kaj tre malgranda, facile kalkulebla per la fingroj, estas la nombro de tiuj personoj, kiuj iris kun Esperanto de la momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo. Kortuŝite ili povas nun rememori, kiel terure malfacila estis ĉiu paŝo en la komenco, kiam ĉiu aludo pri Esperanto postulis specialan kuraĝon, kiam el ĉiu milo da semoj, kiujn ni en plej primitiva maniero, sen helpo kaj sen rimedoj, pacience ĵetadis en la teron, apenaŭ unu ricevis radikojn.

Dudek kvin jaroj! Grandegan gravecon havas tia peco da tempo en la historio de lingvo artefarita. Lingvoj naturaj kreskas tute trankvile, ĉar kun tia lingvo neniu kuraĝas fari iajn eksperimentojn aŭ fleksi ĝin laŭ sia gusto; sed pri lingvo artefarita ĉiu opinias, ke li havas rajton de voĉo, ke li povas aŭ eĉ devas direkti la sorton de la lingvo laŭ sia kompreno. En lingvo natura ĉiu eĉ plej granda efektiva malbonaĵo neniun incitas, eĉ neniun meditigas, kaj estas akceptata kun plena kontenteco aŭ rezignacio; en lingvo artefarita ĉio ŝajnas al ni kritikinda, ĉiu bagatelo, kiu ne estas konforma al nia gusto, pikas al ni la okulojn kaj vekas deziron de refarado. Lingvo artefarita dum longa tempo estas elmetata al senĉesaj ventoj, al senĉesa tirado kaj puŝado. Kiom da ventoj, kiom da senĉesa tirado nia lingvo devis suferi dum sia dudekkvinjara vivo! Se ĝi tamen ĉion sane eltenis, se malgraŭ ĉiuj ventoj kaj puŝoj ĝi dum dudek kvin jaroj vivis kaj kreskis regule kaj rekte, ĉiam pli fortiĝante kaj riĉiĝante, neniam fleksiĝante aŭ kripliĝante, neniam minacante disfali en dialektojn, sed ĉiam pli kaj pli fortikigante sian tute difinitan, ĉie egalan spiriton, neniam perdante hodiaŭ, kion ĝi akiris hieraŭ, – ni povas pri tio sincere nin gratuli.

Antaŭ dudek kvin jaroj mi timeme demandis min, ĉu post dudek kvin jaroj iu

en la mondo scios ankoraŭ, ke ekzistis iam Esperanto, kaj – se Esperanto vivos – ĉu oni tiam povos ankoraŭ kompreni ion, kio estis skribita en Esperanto en ĝia unua jaro, kaj ĉu angla esperantisto povos kompreni esperantiston hispanan. Nun pri ĉi tio la historio donis jam plenan kaj perfekte trankviligan respondon. Ĉiu el vi scias, ke verko, skribita en bona Esperanto antaŭ dudek kvin jaroj, en plena mezuro konservas sian bonecon ankaŭ nun, kaj la legantoj eĉ ne povas diri, ke ĝi estas skribita en la unua jaro de ekzistado de nia lingvo; ĉiu el vi scias, ke inter la stilo de bona angla esperantisto kaj la stilo de bona hispana esperantisto en la nuna tempo ekzistas absolute neniam diferenco. Nia lingvo konstante progresas kaj riĉiĝas, kaj tamen, dank' al la reguleco de sia progresado, ĝi neniam ŝanĝiĝas, neniam perdas la kontinuecon kun la lingvo de tempo pli frua. Kiel la lingvo de homo matura estas multe pli riĉa kaj pli elasta, ol la lingvo de infano, kaj tamen la lingvo de ĝuste parolanta infano neniam diferencas de la lingvo de homo matura, tiel verko, skribita en Esperanto antaŭ dudek kvin jaroj ne estas tiel vortoriĉa, kiel verko skribita en la nuna tempo, kaj tamen la lingvo de tiu tempo perdis absolute nenion el sia valoro ankaŭ en la nuna tempo.

Lingvo, kiu eltenis la provon dum dudek kvin jaroj, kiu en plej bona kaj ĉiam pli floranta stato travivis jam tutan homan generacion kaj estas jam pli maljuna, ol multaj el ĝiaj uzantoj, kiu kreis jam grandan, potence kreskantan literaturon, kiu havas sian historion kaj siajn tradiciojn, sian tute precizan spiriton kaj siajn tute klarajn idealojn, – tia lingvo ne bezonas jam timi, ke io pereige depuŝos ĝin de tiu natura kaj rekta vojo, laŭ kiu ĝi evoluas. La vivo kaj la tempo garantiis al nia lingvo naturan forton, kiun neniu el ni povas senpune malrespekti. La hodiaŭa jubileo estas festo de tiu vivo kaj tempo.

Por ke ni, vivantoj, povu festi la hodiaŭan jubileon, fervore kaj sindone laboris multaj personoj, kiuj nun jam ne vivas. Nia morala devo estus rememori ilin en la nuna solena momento. Sed ho ve! ilia nombro estas tro granda, por ke ni povu ilin ĉiujn citi, kaj krom tio la pli granda parto el ili laboris tiel modeste, ke ni eĉ ne scias iliajn nomojn. Tial, por ne fari maljustan apartigon inter eminentuloj kaj ne- eminentuloj, mi citos nenium apartan nomon. Mi devas fari escepton nur por nia kamarado Van der Biest, kies nomo estas ankoraŭ tro freŝa en la memoro de ni ĉiuj, kiu en la pasinta jaro aranĝis kaj prezidis nian grandan ĉiujaran feston, kaj kies morto estas sendube ligita kun tiuj grandaj laboroj kaj malagrabloj, kiujn li prenis sur sin por ni ĉiuj. En via nomo mi esprimas funebran saluton al la ombroj de ĉiuj niaj karaj kamaradoj, kiujn dum la pasintaj dudek kvin jaroj forŝiris de ni la morto. Iliaj ombroj staru nun antaŭ niaj okuloj, kvazaŭ partoprenante en tiu granda festo, kiun ili preparis, sed ne ĝisvivis. Mi

proponas al vi, ke ni honoru ilian memoron per leviĝo de niaj seĝoj.

Nun, kiam la matureco de nia afero estas jam tute eksterduba, mi turnas min al vi, karaj samideanoj, kun peto, kiun mi jam antaŭ longe volis direkti al vi, sed kiun mi ĝis nun prokrastis, ĉar mi timis fari ĝin tro frue. Mi petas, ke vi liberigu min de tiu rolo, kiun mi, pro kaŭzoj naturaj, okupis en nia afero dum dudek kvin jaroj. Mi petas vin, ke de la nuna momento vi ĉesu vidi en mi “majstron”, ke vi ĉesu honori min per tiu titolo.

Vi scias, ke tuj en la komenco de nia movado mi deklaris, ke mi ne volas esti mastro de Esperanto, sed ke la tutan mastrecon pri Esperanto mi en tuta pleneco transdonis al la esperantistoj mem. Vi scias ankaŭ, ke de tiu tempo mi ĉiam lojale agadis aŭ almenaŭ penis agadi konforme al tiu deklaro. Mi donadis al vi konsilojn, kiel mi povis, sed neniam vi aŭdis de mi la vortojn “tion mi postulas” aŭ “tion mi deziras”. Neniam mi provis altrudi al vi mian volon. Tamen, konsciante, ke ĝis sia plena fortikiĝo nia afero bezonas ian enkorpigitan standardon, mi – laŭ via deziro – dum dudek kvin jaroj plenumadis tiun rolon, kiel mi povis, kaj mi permesadis, kvankam tre nevolonte, ke vi vidu en mi ĉefon kaj majstron. Kun ĝojo kaj fiereco mi konstatas, ke vi ĉiam montris al mi sinceran konfidon kaj amon, kaj pro tio mi eldiras al vi mian plej koran dankon.

Sed nun permesu al mi, ke mi fine formetu de mi mian rolon. La nuna kongreso estas la lasta, en kiu vi vidas min antaŭ vi; poste, se mi povos veni al vi, vi ĉiam vidos min nur inter vi.

Jen estas la kaŭzo, kiu devigis min fari la nunan decidon:

La ekzistado de ia natura konstanta ĉefo, eĉ se tiu ĉefo havas nur la karakteron de unuiganta standardo, prezentas gravan maloportunaĵon por nia afero, ĉar ĝi donas al la afero kvazaŭ personan karakteron. Se al iu ne plaĉas mia persono aŭ miaj politike-religiaj principoj, li fariĝas malamiko de Esperanto. Ĉion, kion mi persone diras aŭ faras, oni ligas kun Esperanto. La tro honora titolo de majstro, kiun vi donas al mi, kvankam ĝi en efektiveco koncernas nur la aferon de la lingvo, fortenas de Esperanto multajn personojn, al kiuj mi pro ia kaŭzo ne estas simpatia kaj kiuj timas, ke, fariĝante esperantistoj, ili devus rigardi min kiel sian moralan ĉefon. Ĉiu, kies opinio pri aferoj esperantistaj estas alia ol mia, ofte sin ĝenas eldiri libere sian opinion, por ne kontraŭbatali publike tiun, kiun la esperantistoj nomas sia majstro. Se ies opinio la esperantistoj ne volas akcepti, li vidas en tio nur la ĉiopovan influon de la majstro. Nun, kiam nia afero estas jam sufiĉe forta, estas necese, ke ĝi fine fariĝu absolute libera, ne sole libera de ĉiuj personaj dekretoj, kia ĝi fariĝis jam antaŭ dudek kvin jaroj, sed ankaŭ de ĉia efektiva aŭ ŝajna persona influo. Estas

necese, ke la mondo sciiĝu tute klare, ke Esperanto povas havi aŭ ne havi siajn libere elektitajn gvidantojn, sed ke ĝi posedas nenian konstantan majstron. Nomu min per mia nomo, nomu min fondinto de la lingvo, aŭ kiel vi volas, sed mi petas vin, ne nomu min plu “majstro”, ĉar per tiu morale tro liganta nomo vi malliberigas nian aferon.

Multaj el vi portas en sia koro la samajn idealojn, kiel mi, kvankam ne ĉiuj en tute egala formo; sed la mondo devas scii, ke tiu spirita parenceco inter mi kaj vi estas laŭvola, ke la esperantismo kaj la esperantistoj ne povas esti respondaj pri miaj personaj ideoj kaj aspiroj, kiuj por neniu el vi estas devigaj. Se mi ion diras aŭ faras, kio ne estas konforma al la gusto aŭ konvinkoj de tiu aŭ alia el vi, mi deziras, ke tio neniu el vi ĝenu kaj ĉiu el vi havu la rajton diri: tio estas tute privata ideo aŭ frenezaĵo de Zamenhof, kaj ĝi havas nenion komunan kun la esperanta movado, en kiu li estas nun persono tute privata. La interna ideo de Esperanto, kiu havas absolute nenian devigon por ĉiu esperantisto aparta, sed kiu, kiel vi scias, plene regas kaj ĉiam devas regi en la esperantaj kongresoj, estas: sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkiutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton. Ĉio, kio estas super tiu interna ideo de Esperanto, estas nur privataĵo, kiu povas eble esti bazita sur tiu ideo, sed neniam devas esti rigardata kiel identa kun ĝi.

Antaŭ ol mi formetas de mi ĉian oficialan rolon en nia afero, mi ankoraŭ la lastan fojon admonas vin: laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo. Ĉiujn dubajn demandojn, kiuj koncernas la tutan esperantan aferon, kaj kiuj ne tuŝas la personan liberecon de ĉiu aparta esperantisto, solvu ĉiam pace, per regula interkonsiliĝo de viaj egalrajte elektitaj delegitoj kaj per disciplina cedo de la malplimulto al la plimulto. Neniam permesu, ke en nia afero regu la principo: “kiu pli laŭte krias, tiu estas prava”. Per unueco ni pli aŭ malpli frue certe venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune. Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava socia problemo, ke, por atingi nian celon, ni devas konstante propagandi nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu estimon kaj konfidon por ĝi. Se en nia afero aperas io, kio ŝajnas al ni malbona, ni povas trankvile ĝin forigi per komune interkonsentita decido; sed ni neniam semu en nia tendaro reciprokan malamon kaj malpacon, kiu nur ĝojigas kaj triumfigas niajn malamikojn. En la unuaj jaroj de nia laborado sur nia standardo estis skribitaj la vortoj “espero, obstino kaj pacienco”; tio tute sufiĉis, ĉar ke ni, samideanoj, devas reciproke nin estimi kaj helpi, tio por ĉiu estis

komprenebla per si mem. En la lastaj jaroj ni bedaŭrinde ofte forgesis tiun devon; tial nun, transirante en la duan gravan periodon de nia historio, en la duan kvaronjarcenton, ni skribu sur nia standardo novan vorton, kaj ĉi tiun vorton ni ĉiam respektu kiel sanktan ordonon; tiu vorto estas: “konkordo”.

Mi finis tion, kion mi intencis diri al vi, karaj amikoj. Mi scias tre bone, ke multajn el vi mia nuna parolo malagrable senluziigos. Kun maldolĉa sento de neplenumita espero vi eble demandos: ĉu en sia lasta kongresa parolo, en sia “kanto de cigno”, li nenion pli havis por diri al ni? ĉu en la grava tago de la jubileo de la esperantismo, de tiu jubileo, kiun ni atingis post tiom multe da laboroj kaj suferoj, li nenion pli havis por diri al ni? ĉu en la unua kaj eble ankaŭ la lasta fojo, en kiu ni el ĉiuj partoj de la mondo alproksimiĝis, kiom ni povis, al tiu loko, kie Esperanto naskiĝis kaj kie la atmosfero, saturita de intergenta malpaco, per neevitebla natura reago naskis la esperantisman movadon, – ĉu en ĉi tiu grava kaj solena momento li nenion pli havis por diri al ni? Ho ne, miaj karaj amikoj, miaj karaj samideanoj kaj kunlaborantoj! Multe, multe, tre multe mi volus hodiaŭ diri al vi, ĉar mia koro estas plena; en la jubilea momento de la esperantismo mi volus paroli al vi pri tio, kio naskis la esperantisman, pri ĝia esenco kaj espereblaj sekvoj; sed hodiaŭ mi staras antaŭ vi ankoraŭ en rolo oficiala, kaj mi ne deziras, ke mia privata kredo estu rigardata kiel deviga kredo de ĉiuj esperantistoj. Tial pardonu min, ke mi pli ne parolas.

Kio estas la esenco de la esperantisma ideo kaj al kia estonteco alkondukos iam la homaron la interkompreniĝado sur neŭtrale-homa, sengenta lingva fundamento, – tion ni ĉiuj sentas tre bone, kvankam ne ĉiuj en tute egala formo kaj grado. Ni donu do hodiaŭ plenan regadon al tiu silenta, sed solena kaj profunda sento kaj ni ne profanu ĝin per teoriaj klarigoj.

Samideanoj! La antikva pola ĉefurbo, en kiu ni kunvenis, pretigis por ni gastaman akcepton, faris multe, por honori nian aferon kaj por agrabligi al ni nian restadon dum la kongreso. Mi esperas, ke, revenante en sian hejmon, ĉiu el vi kunportos kun si plej bonan rememoron pri tiu lando kaj urbo, kiujn la plimulto el vi ĝis nun verŝajne tre malmulte konis. Al la regno kaj lando, kiuj montris al ni sian amikecon, sed precipe al la estraro de la gastama Krakovo kaj al ĉiuj institucioj kaj personoj, kiuj donis al nia kongreso sian moralan kaj materialan subtenon, mi esprimas en via nomo plej koran dankon. Plej koran kamaradan dankon mi esprimas kompreneble antaŭ ĉio al la senlaca loka organiza komitato, kiu ne ŝparis laboron por la plej bona aranĝo de nia kongreso. Kaj nun mi deziras al vi ĉiuj gajan feston kaj sukcesan laboron.

Loke kaj monde



*Supre: Somera ekskurso de KEK al muzeo Sophienholm en Lyngby
Sube: Danaj partoprenantoj de la Universala Kongreso en Rejkjaviko*

